

La **Riverego** *kebekia esperantista bulteno*

Novembro 2003

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 18, N. 74

Avo Frosto respondos al la leteroj de la geknaboj... en Esperanto!

Kristnasko 2002 alvenas kaj kiel ĉiujare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso. Nove, la geinfanoj kiuj skribos al Avo Frosto ricevos respondon en Esperanto.

Normand Fleury

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperanlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estas inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj siaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso, kiu aperas meze de la paĝo.

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

La adreso de Avo Frosto:

**AVO FROSTO
NORDA POLUSO
HOH OHO
KANADO - CANADA**

Ni ankaŭ invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel, ke la esperantlingvaj infanoj povos skribi al Avo Frosto ĉijare. Por ricevi pliajn informojn, kontaktu nin je avofrosto@yahoo.ca

Se vi planas publikigi artikolojn pri tio kun kristnaskaj ilustraĵoj, vi trovos taŭgajn bildojn ĉe la sekva retejo : membres.lycos.fr/avofrosto Ni dankas antaŭe se vi povus sendi al ni ekzempleron de revuo, kie la informo aperis.

Estas la unuaj Kristnaskoj kiam Avo Frosto uzos Esperanton kaj ĉar li laboras multe dum tiu jarperiodo, povas esti ke li iom eraros en la liverado de siaj korespondaĵoj.

Ekzemple, li povus erari lingvojn au perdi leterojn. Se bedaŭrinde tio okazus al vi, ne estu tro malgaja rilate lin. Anstataŭ, sendu retmesaĝon al avofrosto@yahoo.ca kaj la Esperanto-Societo Kebekia transdonos viajn komentojn al la Kanada Poŝta Servo. Ni bonvenigas ankaŭ aliajn komentojn. Feliĉan Kristnaskon! Ho! Ho! Ho!

Le Père Noël parle espéranto!

Le Père Noël répond aux enfants en espéranto depuis l'an dernier. En effet, les employés de Postes Canada qui répondaient aux lettres adressées au fameux personnage en diverses langues, ont maintenant une version en espéranto grâce à Sylvain Auclair, trésorier de la SQE. Invitez les enfants à écrire à: Avo Frosto, Norda Poluso, Canada, HOH OHO

Esperantomobilo

Kunlabore kun UEA/TEJO, ĝia Amerika komisiono, ELNA/USEJ (Usono), KEA/JEK (Kanado) kaj E@I (Esperanto@Interreto), ni prezentas al vi la novan projekton, Esperantomobilo. Ni havas teamon de 6 esperantistoj (3 geusonanoj kaj 3 gerusoj) kiuj vojaĝos tra Ameriko instruante Esperanton. Komence ni trairos Kanadon kaj Usonon kaj

post evaluado de la projekto, ni daŭrigos al Meksiko kaj suden. Ni planas komenci la vojaĝon la 20^{an} de junio 2004 en Bostono, Usono. Ni jam havas la rimedojn por la unuaj tri monatoj, sed la daŭro de la vojaĝo dependos de vi!

Tial mi petas vian helpon. Komprenoble ni bezonos monon por aĉeti la Esperantomobilon, benzinon, riparojn, asekuron, manĝojn, ktp, kaj laŭ nia buĝeto tio kostos al ni \$13.000 USD (11.000 EUR) por la unuaj tri monatoj kaj \$7.000 USD (6.000 EUR) por ĉiuj tri monatoj poste. Se vi interesiĝus finance helpi nin, vi povas donaci monon nome de ni pere de ESK aŭ

UEA (konto: emob-k).

Ankaŭ, vi povas kontakti nin rekte aŭ vidi nian retpaĝaron por pli de detaloj www.esperantomobilo.org/helpu-donacu.html

Ni esperas ke ni povos ankaŭ esti intervjuataj de naciaj televidaj kaj radiaj stacioj, ĉar ĉi tio estas unu el la plej grandaj Esperanto-projektoj de gejunuloj en la historio de la Esperanto-movado en Ameriko. Por pli da detaloj, bonvolu viziti nian retpaĝaron ĉe www.esperantomobilo.org/

Cuck Smith
Esperantomobilo
Eksteraj Rilatoj

Realiĝu frue! Réabonnez-vous vite!

Sylvain Auclair

La estraro de ESK tre ŝatus, ke la membroj sendu sian realiĝilon (kun la pago, komprenoble...) tuj post la ricevo.

Tio estas des pli grava se oni samtempe reabonas al *Le Monde de l'Espéranto*. Ĉar ni devas mendi la ĝustan nombron da ekzempleroj, malfrua reabono povus kaŭzi tion, ke vi maltrafos unu numeron.

Les administrateurs de la Société apprécieraient beaucoup que les membres renvoient leur formulaire de réadhésion (avec le chèque, bien entendu...) dès qu'ils le reçoivent. Cela est d'autant plus important si, par la même occasion, on se réabonne au *Monde de l'Espéranto*. Comme nous devons commander le nombre exact d'exemplaires, un réabonnement trop tardif pourrait nous empêcher de vous faire parvenir tous les numéros correctement.

Kelkaj novaĵoj el la estraro

La Esperanto-Societo Kebekia nun havas novan afiŝon, farita de Jérôme-Frédéric Bouchard. Vi eble jam vidis ĝin, aŭ vidos ĝin dum venonta evento: ĝi prezentas maljunan virinon kiu montras la langon. Kaj sube, oni diras, en la franca: "L'espéranto. L'autre langue". Ni ankaŭ havas novan, pli viglan kaj modernan emblemon, kiun vi povas vidi en nia reta paĝaro. Ha... La retpaĝaro estas ankaŭ iomete pli vigla, kun novaj koloroj. Vi povas vidi ĝin ĉe www3.sympatico.ca/esperanto.

* * *

Kadre de la ĝenerala kunsido, la 7^{an} de septembro, la prezidento Normand Fleury konstatis, ke "nia movado estas en transira periodo. En la tuta mondo, la asocioj perdas membrojn, pro teknikaj amaskomunikiloj". Li ankaŭ aldonis,

ke "ni kreis antaŭ 20 jaroj societeton kiu kreskis dum 10 jaroj, sed nun malkreskas, eĉ se estas pli kaj pli da Esperantistoj dank'al varbado, kursoj, retaj informiloj". Li demandis: "Kian movadon ni volos por la venontaj jaroj?". Vi vidos kelkajn proponojn en tiu *Riverego*. Sed ĝenerale, la ĉeestantoj konsentis, ke malgraŭ, ke la Esperantistoj pli kaj pli trovas tion, kion ili volas ekster la ESK, ankoraŭ taŭgas plu vivigi ĝin, kiel "flago" por la ne-Esperantistoj...

* * *

Nova "viktimo" de la Reto: la telefonlinio de la ESK preskaŭ ne plu estis uzata. Eĉ la Kanada Esperanto-Asocio ne plu vidis la taŭgecon konservi ĝin. Tiel, ni baldaŭ fermos la konton. Ni tiel ŝparos preciozan monon. Sed ni daŭre plezure respondos rete aŭ letere!

Kion ni celas?

Francisko Lorrain

Por multaj Esperantistoj, la celo de Esperanto estas, ke ĝi disvastiĝu, ĝis kiam ĝi iĝu la internacia lingvo ĝenerale uzata kadre de interlandaj rilatoj. Nu, se tio okazos, bonege! Sed en tiu ebla disvastiĝo de Esperanto kuŝas, laŭ mi, serioza danĝero. Vidu. Ĝis nun, ĉiuj esperantistoj amas sian lingvon. Ĝi estas nia lingvo. Sed kio okazos, se Esperanto fariĝos deviga internacia lingvo por multaj homoj? Ĉu ili amos ĝin, kiel ni hodiaŭ? Eble ne tute, eĉ se ĝi vere restos simbolo de libereco, egaleco kaj frateco (laŭ la franca devizo). Kaj ĉu ĝi fakte restos tia simbolo? Eble ne tute. Ĉu ne danĝere?

Ni povas pli konkrete kompreni la danĝeron, se ni pripensas la novan Eŭropon. Ne maleblas, ke Esperanto iun tagon fariĝos la komuna helplingvo de Eŭropo (ni rajtas revii!). Tiu kontinento estas iĝanta, iom post iom, unu lando. Tio estas gravega fakto en la hodiaŭa mondo: la suprenirado de Eŭropo, Ĉinio, Barato... kaj, frue aŭ malfrue, la korelativa malsuprenirado de Usono. Ekzistas ebleco reala, ke, post kelkaj aŭ pluraj jardekoj, Esperanto anstataŭos la anglan en Eŭropo. Do, Esperanto fariĝu oficiala lingvo tie, kaj sekve unu el la oficialaj lingvoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Tute bone. Sed — jen la kaptilo — nun estas Esperanto la lingvo de tre potenca ŝtato! Ho ve, ĉu ĝi ne plu estas lingvo de la tuta

homaro? Imagu nur, ke iuj ideologoj kaptus la esperantistan idealon kaj provus trudi ĝin al aliaj homoj “por ilia propra bono.” Kia malfeliĉo! Oni bezonus novan Zamenhofon, kiu inventus novan neŭtralan lingvon, kaj oni devus ĉion rekomencadi...

Jen nun dua demando — pri kiu mi neniam aŭdis aŭ legis konvinkan diskuton. Esperantistoj kutime diras, ke, se Esperanto iĝus pli uzata ol la angla en la mondo, tiam la naciaj lingvoj, liberigitaj de la pezo de la

Malfacilas imagi, ke, post kelkaj jarcentoj aŭ jarmiloj de tia tutplaneda kirliĝado, iu ajn nacia lingvo povus pluekzisti!

malneŭtrala Ŝekspira lingvo, eĉ revigliĝus. Kompreneble, samtempe kun granda disvastiĝo de Esperanto, la neanglalingvaj landoj estus pli liberaj disvolvi sian propran kulturon laŭ siaj propraj emoj. Sed kio okazus poste? Iom post iom, pli kaj pli da homoj ĉiutage rilatus Esperante kun aliaj, aperus pli kaj pli da internaciaj Esperantaj paroj kaj denaskaj Esperantlingvanoj, pli kaj pli da homoj loĝus en pluraj landoj, aŭ samtempe aŭ sinseke, dum sia vivo. Malfacilas imagi, ke, post kelkaj jarcentoj aŭ jarmiloj de tia tutplaneda kirliĝado, iu ajn nacia lingvo povus pluekzisti!

Nacia lingvo povas vivi, nur se ĝiaj parolantoj ĉefe inter si kunvivas. Se tia kunvivado iom post iom malaperas, anstataŭita de ia

geografie pli grandskala vivmaniero, la lingvo ankaŭ iom post iom mortas. Jam nuntempe tiel mortas pluraj lingvoj ĉiujare!

Ĉiaokaze, kun la diversaj detruimedoj, kiujn ĝi posedas kaj posedos, la homaro, aŭ fariĝos unu sola popolo (kio implicas unu lingvon — ĉu Esperanton, ĉu la anglan, la ĉinan, aŭ alian), aŭ ne estos. Punkto. Laŭ mi, lingva unuiĝo estas unu el la prezoj, kiujn ni, bedaŭrinde, nepre devos pagi por estiĝi mondan pacon. Tamen tio ne signifas, ke ni devas, ekde nun, celi anstataŭigi ĉiujn naciajn lingvojn per Esperanto. Ne, tiaj klopodoj estus vanaj, ĉar ankoraŭ tro fruas. Tiu neevitebla unuiĝo fariĝos paŝon post paŝo, laŭ normala evoluo, dum jarcentoj.

Kiuj do devas esti niaj celoj? Mia sinteno similas al tiu de la fama Raŭma Manifesto de 1980 (vidu homepage.ntlworld.com/edmund.grimley-evans/rauxmo.html). Mi ne celas baldaŭan “finan venkon” — laŭ mi iluzian. Por mi sufiĉas kontribui ĉi-maniere: 1^e internacie komuniki per la lingvo, kio donas konkretan ekzemplon de funkcia egaleca internacia komunumo, kaj 2^e, rilate ne Esperantistojn, provi tuŝi ilin, parolante pri la interna ideo, Esperantaj aŭtoroj aŭ interesaj okazaĵoj en la Esperanta mondo. Mi vidas Esperanton kiel unu rimedon, inter multaj aliaj, por kontribui al la iompostioma kultura, spirita, kaj eĉ politika unuiĝo de la homaro — kio, kiel dirite, postulos jarcentojn, laŭlonge de neantaŭvidebla historio.

Kelkaj anek

Ĉiuj anekdotoj de ĉi tiu paĝo venas el la *Abonu.com*, retlisto "anekdotoj en Esperanto".

Abonu.com

Bonega, sed ne tre inteligenta futballudisto postulas pli altan salajron. Post longa diskuto la klubestro diras:

- Bone, ni pagos al vi trionon pli ol en la lasta jaro.

- Tio ne sufiĉas, - respondis la ludisto, - mi postulas minimume kvaronon.

Kion vi NE volas aŭdi kiam ĥirurgoj operacias vin:

1. Feeeeeeeeeeeeek!
2. Ĉu iu vidis mian horloĝon?
3. Kial mi tiom ebriiĝis hieraŭ?
4. Fikfek! En la manlibro por ĥirurgoj oni forŝiris la 47^{an} paĝon!
5. Portu reen! Netaŭga hundeto!
6. Hm... Li, espereble, jam havas infanojn?!
7. Knaboj, ni rapidu! Post duonhoru komenciĝas futbalo!
8. Helpantino, donu al mi, eeeeeeee... uuu... nu, tiun... eeee... FEK!!!
9. Nu, kara kolego! Se ĉi tio estas apendico, do kiel nomiĝas ĉi tiu afero?
10. Jen diablo! Denove oni forŝaltis la elektrotension!
11. Ĉiuj malantaŭen! Mia lenso elfalis!
12. Do, kolegoj, la hodiaŭa operacio estas edifa leciono por ĉiuj ni!

Dek signaloj, ke oni ne ŝatas vin en via oficejo:

1. Sur ĉiu deŝirebla parto de la speciala neceseja papero estas printita via foto.
2. Dum labortago oni ĵet-atakas vin per ŝtonetoj kaj paperpecoj.
3. Anstataŭ komputilo oni enmanigis al vi skribtabulon kaj abakon.
4. Via kolegino je via ĉeesto manĝas dolĉajn bombonojn.
5. Oni pagas al vi vian salajron per metalaj moneroj.
6. La naskiĝtaga donaco por vi estas blanka t-ĉemizo kun cel-punkto sur la brusto kaj la dorso (ideale - kun la vorto "Celo?").
7. Sur la pordo de via kabineto oni desegnis du nulojn.

8. La peticion por maldungi vin subskribis ĉiuj viaj kolegoj, inkluzive de la purigistino kaj ĉiuj sekurservistoj.

9. Foto de via edzino staras sur labortabloj de minimume 12 el viaj kolegoj.

10. Vi estas la ĉefo!

Knabo eniras apotekon kaj petas al vendisto:
- Bonvolu doni al mi unu kondomon - mi havas amrendevuon kun mia koramikino. Sed tamen donu du: ŝi havas belegan fratino! Aŭ ne, prefere donu tri: ankaŭ ŝia patrino belegas!

Post la aĉeto li iras al sia amikino. Ŝi invitas lin tagmanĝi kune kun sia familio. Li konsentas, sed tuj post eniro en la manĝoĉambro li fariĝas silenta, tomate ruĝa, kaj terure sinĝena. Post la tagmanĝo lia amikino demandas lin:

- Kial vi diris eĉ ne unu vorton dum la tagmanĝo, ĉu la pladoj ne plaĉis al vi?

- Estis bonguste... Sed mi en plej terura premsonĝo ne vidis, ke via patro estas vendisto en apoteko.

Junaj geedzoj, ĵus kverelintaj, aŭtoveturas. Jen ili reterveturas kelkajn azenojn.

Li:

- Ĉu estas via familio?

Ŝi:

- Jes, la bofratoj.

Kruko estas en la drinkejo *Verda Krepusko*. Ĉe la bufedo staras du jam sufiĉe ebriaj viroj, kiuj interparolas:

- Ho, Ŝinjoro, vi havaŝ tre belan ĉapelon!

- Dankon, Ŝinjoro, mi fakte fieras pro ĝi.

- Kie vi aĉetiŝ ĝin?

- Mi aĉetiŝ ĝin ĉe butikio "Ĉio por Ĉiu".

- Ĉu tie? Ankaŭ mi oftege iras tien. Ĉu ankaŭ vi vivaŝ en tiu kvartalo?

- Jeŝ. Mi loĝas en la Kverk-Ŝtrato.

- Nekredeble! Ankaŭ mi loĝas en tiu ŝtrato!!!

Kruko mirigite diras al la kelnero:

- Nekredeble, ke tiuj du uloj loĝas en la sama strato, kaj nur nun renkontiĝas.

La kelnero respondas:

- Ne kredu tion, amiko. Fakte, ili estas patro kaj filo - sed, kiel kutime, ili estas tiom ebriaj, ke ili ne rekonas unu la alian!

Viro sentis sin malsana, kaj do vizitis sian kuraciston por ekzamenado. Iom poste li revenis por ekscii la rezultojn.

- Bedaŭrinde, mi havas tre malbonan novaĵon, - la kuracisto diris. - Vi estas mortanta, kaj malmulte da tempo restas al vi.

- Ho, tio estas terura! - ekkriis la viro. - Kiom da tempo restas al mi?

- Dek - respondis la kuracisto.

- Dek? - demandis la viro. - Dek da kio? Monatoj? Semajnoj? Kio?!!

- Naŭ...

Jen Jozefina estas la plej bona dommastrino en la mondo. Ŝi jam divorcis dek kvin fojojn... kaj ŝi daŭre estas la mastrino de sia domo!

Saĝa viro + saĝa virino = amafero.

Saĝa viro + malsaĝa virino = flirto.

Malsaĝa viro + saĝa virino = geedziĝo.

Malsaĝa viro + malsaĝa virino = gravediĝo.

Geedzoj sendis sian filon al la avo. Post 2 semajnoj ili telegramis: "Ne veturigu reen la nepon, ĉi tie furiozas uragano". La avo respondis: "Mi sendas la nepon kaj vi sendu la uraganon. Mi preferas ĝin".

Pingveno eniras drinkejon:

- Donu al mi duoblan viskion.

La vendisto, embarasita, iras al sia ĉefo kaj rakontas la situacion. La ĉefo diras:

- Prenu de li 20 eŭrojn!

La vendisto tiel faris. La pingveno pagis kaj trankvile stariĝis apude, trinkante sian viskion. La vendisto, daŭre embarasita, sed scivolema, tamen kuraĝis demandi:

- Fakte, ne ofte pingvenoj vizitas nian drinkejon!

La pingveno respondas:

- Ili tute ne vizitos vin, se vi pagigos ilin po 20 eŭroj por ĉiu duobla viskio.

- Junulo, ĉu vi povas al mi klarigi, - furiozas kolerega patro de iu junulino - kial vi kisis mian filon en tiu malluma angulo?

- Jes-jes, paĉjo, kiam mi ŝin vidis ĉe la lumo, mi mem demandis min pri la samo.

dotoj el la Reto

- Ĉu mi estas la unua viro, kiun vi iam amis?
- Kompreneble. Sed por mi estas interese, kial ĉiuj viroj ĉiam demandas la samon?

Je la tria matene, komizo en hotelo ricevas telefonan vokon de ebrulo, kiu demandas je kiu horo la hotela drinkejo malfermiĝos.

- Ĝi malfermiĝas tagmeze, sinjoro, - respondas la komizo.

Post unu horo la komizo ricevas plian telefonvokon de la sama ulo, kiu ŝajnas esti eĉ pli ebria:

- Je kiu horo malfermiĝas la drinkejo?

- Je la sama horo kiel antaŭe - tagmeze, sinjoro, - respondas la komizo.

Plia horo pasas. La ebrulo denove telefonas, eĉ pli ebrie:

- Je kju 'oro vi ziris ke malf'rmij's la ĵrinkejo, a?

La komizo diras:

- La drinkejo malfermiĝos tagmeze, sinjoro, sed se vi ne povas atendi ĝis tiam por eniri la drinkejon, mi povas aranĝi ke la servisto portu ion al via ĉambro.

- Neeee, ulo... mi ne v'las eniri la ĵrinkejon - s'd mi volas ELIRI!!

- Ho, karuĉjo, - diras la junedzino al sia junedzo, - nur pensu! Ni geedziĝis antaŭ nur dudek kvar horoj!

- Jes, karinjo, - respondas la junedzo al la junedzino, - estas nekredeble. Kaj ŝajnas, kvazaŭ tio estis nur hieraŭ!

La kompanio "Intel" post la sukcesa produktado de la procesiloj Pentium-1, Pentium-2, Pentium-3 kaj Pentium-4 decidis produkti procesilojn "Pentium vivas" kaj "La reveno de Pentium".

Dum la nupta ceremonio en la preĝejo, la estonta novedzo subite paliĝas kaj interrompas la pastron:

- Pardonu, sinjoro pastro, kiel vi diris? Kiom longe?!

Kruko fanfaronas:

- Mi estas vera gravulo: mi havas pli ol mil personojn sub mi!

Baniko:

- Normale. Vi estas ĝardenisto en tombejo!

Inteligenta estro plus inteligenta laboristo estas PROFITO.

Inteligenta estro plus stulta laboristo estas PRODUKTADO.

Stulta estro plus inteligenta laboristo estas PROMOCIO.

Stulta estro plus stulta laboristo estas ALDONAJ LABORHORJOJ.

En haltejo staris junulino, atendante buson.

Apud ŝi aperis iu homo, envolvita en longa mantelo. Post iu tempo li proksimiĝis kaj tuŝis ŝin per la fingro. Ŝi miris. Li ree tuŝis ŝin per la fingro. Ŝi konsterniĝis. Post sekva tuŝo ŝi demandis:

- Kion vi faras?! Kiu vi estas?

Tiu respondis:

- Mi estas aliplanedano. Verda homo, en via lingvo.

Kaj malvolvis la mantelon. Vere, ŝi vidis tute verdan korpon, absolute glatan, kiel kukumo, sube de kiu eliras nur du gamboj. Ŝi miris plu:

- Sed... hm... nu... tamen, kiel vi reproduktiĝas?

- Tre simple! - li respondis, - jen tiel! - kaj ree tuŝis ŝin per la fingro.

Instruisto al lernanto:

- Elpensu frazon, en kiu estu la vortoj "kiam" kaj "rigardi".

La lernanto:

- Kiam mi hazarde surpaŝis la kruron de nia kato, ĝi ekkriis: "Rigardi necesas, kien vi paŝas!"

Virino dum 10 jaroj penegas por ŝanĝi la kutimojn kaj trajtojn de karaktero de sia edzo, kaj poste ŝi plendas, ke li ne plu estas tiu homo, al kiu ŝi edziniĝis antaŭ 10 jaroj...

Juna viro, ĵus fininta la universitaton, atingas sian unuan laborpostenon en granda vendejo.

La vendejestro gaje lin salutas, manpremas kaj donante broson, dirante:

- Via unua tasko estas purigi la plankon en la

tuta vendejeto.

La konsternita novulo:

- Tamen... mi ja estas universitata fininto!

- Ho, mil pardonojn, - diras a estro, - mi ne sciis tion. Donu la broson, mi montru al vi, kiel oni tion faras.

Lia:

- Mi absolute rifuzas iri kun edziĝintaj viroj. Jozefina:

- Brave, vi pravas!

Lia:

- Jes. Mi insistas, ke ili mem venu al mi!

Vigla, juna, freŝe diplomita revizoro ĵus dungigis ĉe la Imposta Departemento kaj flamiĝis, ĉar li komencas ĉasi potencajn krimulojn. Antaŭ sia unua revizorado li estis iom konsternita, ĉar lia unua tasko estis revizori rabenon. Inspektado de la kontoj kaj la impostaj registroj estis sufiĉe rekta afero, kaj la rabeno klare estis (tro) ŝparema, do la junulo decidis amuzi sin.

- Rabeno, - li komencis, - mi notis, ke vi aĉetas multe da kandelaj.

- Jes, - respondis la rabeno.

- Nu, rabeno, kion vi faras pri la kandelaj restaĵoj?

- Fakte ni konservas ilin ĝis kiam ni havas sufiĉe de ili, tiam ni sendas ilin al la kandelisto. Kaj de tempo al tempo li sendas al ni senpagan skatolon de kandelaj.

- Hmm, - respondis la revizoro, desapontita ĉar je lia nekutima demando la rabeno fakte havis praktikan respondon.

- Rabeno, kio pri ĉiuj ĉi aĉetoj de maco (seka, biskvita speco de pano)? Kion vi faras pri la pecetoj de maco?

- Fakte mi amasigas ĉiujn pecetojn de la macoj kaj sendas ilin al la fabrikisto, kaj de tempo al tempo ili sendas al ni skatolon de macaj buloj.

- Sed tamen, rabeno, - diris la embarasita inspektoro, - kion vi faras pri ĉiuj el tiuj prepucioj, restantaj post la cirkumcidoj?

- Ho, ankaŭ tiukaze ni ne malŝpariĝas, - respondis la rabeno, - ni konservas ĉiujn el la prepucioj kaj fojfoje sendas ilin al la Imposta Departemento.

- La Imposta Departemento? - nekredeme demandis la revizoro.

- Jes, - respondis la rabeno. - Al la Imposta Departemento. Kaj proksimume unu fojon en la jaro ili sendas al ni etan kaculon, kiel vin nun.

La financa situacio de la Esperanto- Societo Kebekia plu estas streĉa

Sylvain Auclair

Kvankam ni iris de malprofito je 661 \$ en 2001-02 al profito je 681 \$ en 2002-03, plia konsidero de la ciferoj montras, ke la libroj denove devus montri malprofiton similan al tiu de la pasinta jaro. Unue, pro la strikoj en Francio, ni ricevis, pagis kaj sendis nur kvin numerojn de Le Monde de l'Espéranto, kio malplligis niajn kostojn (sed ni devos verŝajne sendi sep da ili ĉi tiun jaron...).

Plie, mi decidis, ke ni devas montri kiel profiton por ESK la akumulitajn profitojn de la kelkaj lastaj okazigoj de OKEMO. Tiel, el nia nuna kapitalo je 3289\$, pli ol mil alie aperus kiel rezervo por OKEMO.

La baza problemo estas, ke plu kaj plu malkreskas la membraro kaj, sekve, la sumo de kotizoj. La Societo estas aro de siaj membroj; se la Kebekiaj Esperantistoj ne konsideras utile plu havigi al si asocion, nia Societo devos iom post iom malaperi. Jen ĉio.

Sylvain Auclair estas kasisto de la Esperanto-Societo Kebekia

Vizitis nin !

Dum la pasinta somero vizitis Montrealon pluraj esperantistoj. Unue venis fine de junio, S^{ro} Jean-Luc Gaudin el Ĝenevo. Profesie, li estas administranto de loĝejaroj. Venis dum julio, paro el Riverside, Kalifornio. Caitleen St-John estas ĉefbibliotekistino ĉe universitata muzika biblioteko. Ŝi sufiĉe bone parolis france kaj scipovas legi la italan, latinan, germanan kaj esperantan lingvojn. Ŝi regule devas traduki el tiuj lingvoj al la angla, informojn pri diskoj kaj muzikaĵoj. Li, Thomas Summer estas kontisto en malgranda kompanio kiu rilatas al bankoj kaj eklernis esperanton en 1965. Li naskiĝis en Bostono tiel ke por vizito al MTL ili iros tien. Estas lia 4-a vizito al Montrealo ĉar li tre ŝatas veni tien ĉi. Samtempe vizitis Joelle Cunnac el urbeto apud Lyon, Francio. Ŝi iam en la 70-aj jaroj vivis 10 jarojn en Montrealo kaj ŝatas fojfoje reveni por revidi geamikojn. Ŝi laboras kiel sekretario en arkeologia centro. Ŝi partoprenas la franca e-movadon kaj babilante malkovris ke ni havis kelkajn komunajn amikojn. Ŝi diris ke Montrealo daŭre plibeliĝas kaj ĉefe la malnova Montrealo.

D'la visite au Québec!

Il n'est pas toujours nécessaire de voyager pour rencontrer des espérantophones étrangers et ainsi pratiquer l'espéranto dans un contexte vraiment international. Depuis juin dernier, nous avons eu la visite de Jean-Luc Gauvin de Genève, d'un couple de Californie, de Joelle Cunnac de Lyon, d'autres Américains qui sont venus faire une escapade ici après le Congrès américain d'espéranto de Boston, du Dr Asĝar Sajadian Autrichien d'origine Iranienne et du Dr Probal Dashgupto de l'Inde. Ce dernier était à Montréal pour un séjour de 3 semaines comme professeur invité à l'Université de Montréal. Il est un linguiste renommé, membre de l'Académie internationale de l'espéranto.

Tradukpetoj

Normand Fleury

Venas regule peton pri tradukado de Esperanto al la franca kaj de la franca al Esperanto Kiam temas pri etaj tekstoj (ekstera publiko) mi pretas fari kaj jam faras ĉar tio ja estas reklamado pri Esperanto: havi frazon en Esperanto dum teatraĵo aŭ en studenta projekto, ktp. Sed nun venas petoj pri tradukado

de retpaĝaro de Esperanto al la franca. Ekzemple, KEA petas tion por la venonta ELNA/KEA kongreso (julio 2004) en Sidney, BC. Due, Chuck Smith de Esperantomobilo ankaŭ petas tion. En ambaŭ kazoj eblas traduki de la angla aŭ de Esperanto al la franca. Sed mi ne havas tempon. Mi ne simple havas tro!
esperanto@sympatico.ca

Kelkaj sugestoj de la membro Jean Alain

Jean Alain

Per tiu ĉi letero, mi volas konatigi al vi mian ĝojan ĉeeston je la lasta jarkunveno de ESK en Montrealo, la 7^{an} de septembro 2003.

Ia sento de laceso, se ne de frustrigo, perceptiĝis ĉe iuj partoprenantoj, fronte al la ŝajne malrapida kaj malforta progresado de Esperanto tra Kebekio : la membraro de ESK plafonas, se ne malkreskas ; simplaj iniciatoj, de longe intreprenitaj, trafas oficialan senintereson : Esperanto Strato en Montrealo, Avo Frostoj, radio-elsendado en Esperanto fare de Radio-Kanado Internacia ktp.

Laŭ mi, kvankam ja kompreneblaj, tiaj sentoj tute malĝustigas. Iuflanke, partopreno en sociaj agadoj ne fidele spegulas la intereson en la lingvo mem, kiu diversmaniere riveligas, laŭpersone. Aliflanke, nuntempaj esperantistoj ne povas altrudi sian projekton al la videble nepretigita amaso. En lia naskotempo, ekzistis por Esperanto granda oportuno, kiu poste malgrandiĝis okaze kaj rezulte de la preskaŭ centjardaŭrinta tuteuropa milito.

La tuj venontaj tempoj (precipe en Eŭropo) eble plifavorigos lian denovan disvastiĝon ol faris la pasintaj, tion ni baldaŭ vidos. Tiukaze, mi opinias (kaj esperas) ke tiu denova disvastiĝo baziĝos sur la plej gravaj kaj potencaj rimedoj de la modernaj ŝtatoj, do rapide atingos ĝian celon.

Intertempe, tamen, nuntempaj esperantistoj pli bone ĝoje okupiĝu pri sia modestskala organizado kaj

simple sin pretigu por povi subteni la amasan intereson, kiam ĝi pli forte manifestiĝos.

Ĉar ĉitempe tiun amasan lingvan disvastiĝon, la nuntempaj esperantistoj mem simple ne povas subteni, solaj. Ĉu, ekzemple, ESK vere celas varbi dek mil novajn membrojn tra Kebekio, ĉu eĉ mil

Nuntempaj esperantistoj ĝoje okupiĝu pri sia modestskala organizado kaj simple sin pretigu subteni la amasan intereson, kiam ĝi pli forte manifestiĝos.

membrojn? ESK jam tuj mortus, rezulte, ĉar tia afero ja temas pri kruta laboro, ne pri plezuro.

Laŭ mi, ESK okupiĝu pri sia ĝoja loka kunvivado. Se plia energio troviĝas, nu, ESK povas helpi, laŭeble, aliajn ĉirkaŭajn grupojn, per kunuigo de siaj fortoj kun tiuj de la aliaj, direktigitaj al komunaj celoj. La unua celo estu simplaj lokaj agadoj, celante la regulan amikaron. La dua estu pli gravaj lokaj agadoj, celante pli vastan partoprenon. Ĉi tiuj malofte okazus, ni diru 2 – 3 foje, jare, ĉar ili necesas plian organizadon kaj planadon. Ili fakte celas partoprenon el eksterurbanoj. Tiaj renkontoj jam ekzistas : MEKARO, OKEMO, Zamenhof-festo. Laŭ mi, tiuj prefere okazus Montreale, ĉar Montrealo kuŝas preskaŭ meze en Orient-Kanado, inter Windsor kaj Kebeko, kie loĝas la granda plimulto de la eĉ Kanada popolo, kaj sur la ĉefaj amastransportiloj.

La tria celo estu helpagadoj por

ekstermontrealanaj esperantistoj: la ĉefa helprimedo tiucele estas la interreto, kompreneble. La Societaj revuoj, biletoj kaj anoncoj prefere estu publikigota surrete, certiganta ilian plian disvastiĝon je malpli granda kosto.

La kvara celo estu agadoj specife celantaj la ĝeneralan publikon.

Laŭeble, oni daŭru subteni la enkonduknivelan esperantan retkurson. Aliflanke: mi proponas partoprenon en la Montreala librofestoj: la Montreala librofestoj estas ja la plej granda kaj grava librofestoj en nia provinco. Ĝi allogas al si vastan amason da personoj diversaj, junuloj, maljunuloj, interesitaj je vortoj, libroj, lingvoj kaj ideoj. Laŭ mi temas pri reprezenta sampla de tiu Kebekia homaro, kiu potencie interesiĝas pri Esperanto. Se ESK ĉeestus la librofeston, tiu homaro venus per si mem senpere al li. ESK devus do kuniĝi al simpatia eldonisto (ekzemple, tiu kiu eldonas por la Ba'hai-aj fideletoj) kaj regulbaze modestskale partopreni en ĉi librofestoj, alportante kun si parton de la libroserva kelekto. Jen vasta varbokampo por la movado.

Bedaŭrinde, tiu intrepreno ne tute indas, ĉar la tiel nomata Montreala librofestoj, fakte, celas nur la francaparolantojn. ESK do prefere ankaŭ partopreni en iu librofestoj por anglaparolantoj. Tio ankaŭ favorigos membrovarbadon el ĉiulingvaparolantaj Montrealanoj kaj plikontribuos al veran "internaciecon" ĉe la ESK-membraro, tio kio pli fidele spegulus la internaciecon de la lingvo mem.

Fête de décembre, ou *Decembra Esperanto-Festo*

Sabato, la 13^{an} de decembro 2003,
je la 18:00 okazos la Decembra
Esperanto-Festo (antaŭ:
Zamenhofa Festo) ĉe la Jardin
Botanique de Montréal, 4101,
Sherbrooke Est, metroo Pie-IX.

Le samedi 13 décembre 2003 à
18h, on fêtera la Fête de décembre
(anciennement *Zamenhofa Festo*)
au Jardin Botanique de Montréal,
4101, Sherbrooke Est, métro Pie-
IX.

Venontaj aktivajoj de la Montreala Klubo

Por la regulaj monataj renkontiĝoj de novembro ĝis junio, ni proponas al vi novan aktivajon: ni hazarde prenis nomojn de landoj, kaj ni invitas vin pretegi 5-10-minutan paroladon pri tio, kion vi konas pri tiu lando. Estas bona maniero praktiki la lingvon!

Vendredo, la 28^{an} de novembro 2003, je la 19:30 (temo: Israelo)
Vendredo, la 30^{an} de januaro 2004, je la 19:30 (temo: Kosta Riko)
Vendredo, la 27^{an} de februaro 2004, je la 19:30 (temo: Nepalo)
Vendredo, la 26^{an} de marto 2004, je la 19:30 (temo: Kuartvelio)
Vendredo, la 30^{an} de aprilo 2004, je la 19:30 (temo: Nov-Zelando)
Vendredo, la 28^{an} de majo 2004, je la 19:30 (temo: Tunizio)
Vendredo, la 25^{an} de junio 2004, je la 19:30 (temo: Slovenio)
Vendredo, la 24^{an} de septembro 2004, je la 19:30
Vendredo, la 29^{an} de oktobro 2004, je la 19:30
Vendredo, la 26^{an} de novembro 2004, je la 19:30

La Riverego (*Le Fleuve*) est publiĉ par la Societĉ quebĉcoise d'esperanto, en janvier, mai, septembre et novembre. Dĉpĉts lĉgaux: Bibliothĉques nationales du Canada et du Quĉbec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilitĉ des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopiĉ ĉ 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Societĉ quebĉcoise d'esperanto. La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto.

Fotokopiita 90-oble. Senpage por la membroj de la ESK.

**Ĝĉeance por le prochain numĉro/Limdato por la venonta
eldono: 2004.01.01**

jessylapointe@hotmail.com

Rĉdakteur en chef/Cĉfiredaktorin Jessy LaPointe. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prĉsident/
prezidanto), Jĉrĉme-Frĉdĉric Bouchard (vice-prĉsident/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trĉsorier/kasisto), Jessy LaPointe

(secrĉtaire/sekretario) kaj Martin Benoit (administrateur/konsilanto).

**Esperanto-Societo Kebekia
Societĉ quebĉcoise d'esperanto**

6358-A, rue de Bordeaux
Montrĉal (Quĉbec) H2G 2R8

Rĉpondeur et tĉlĉcopieur: (514) 272-0151

esperanto@sympatico.ca
www3.sympatico.ca/esperanto

Prochaines activitĉs du Montreala Klubo

Pour les rĉunions mensuelles ordinaires, de novembre ĉ juin, nous vous proposons une nouvelle formule: nous avons pigĉ au hasard le noms de quelques pays. Nous vous invitons ĉ prĉparer un petit exposĉ de 5 ĉ 10 minutes sur ce que vous connaissez de ce pays. Une excellente occasion de pratiquer la langue!

Vendredi 28 novembre 2003, 19h30 (thĉme: Israĉl)
Vendredi 30 janvier 2004, 19h30 (thĉme: Costa Rica)
Vendredi 27 fĉvrier 2004, 19h30 (thĉme: Nĉpal)
Vendredi 26 mars 2004, 19h30 (thĉme: Gĉorgie)
Vendredi 30 avril 2004, 19h30 (thĉme: Nouvelle-Zĉlande)
Vendredi 28 mai 2004, 19h30 (thĉme: Tunisie)
Vendredi 25 juin 2004, 19h30 (thĉme: Slovenie)
Vendredi 24 septembre 2004, 19h30
Vendredi 29 octobre 2004, 19h30
Vendredi 26 novembre 2004, 19h30